# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:40; novembro 11.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: KB. Sume 390 KB


## Montevideo en la memoro

La 10-an de decembro 2024 en Montevideo okazos internacia konferenco pro la 70-a datreveno de la rezolucio de Unesko pri Esperanto, akceptita antaŭ 70 jaroj, la en la ĉefurbo de Urugvajo. Oni povos partopreni la konferencon surloke aŭ rete. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/10/unesko-38/

## Kiel akiri la atenton de amaskomunikiloj

La 19-an de novembro je la 21.00 (UTC+1) okazos reta seminario, kiu kombinas enkondukon al bazaj ĵurnalismaj principoj kun praktika trejnado pri efika informado pri Esperanto kaj Eo-eventoj al la ĝenerala publiko. Surbaze de la plurjara sperto de la ĵurnalisto Massimo Ripani, la partoprenantoj lernos pri verkado de artikoloj, kreado de amaskomunikilaj materialoj kaj starigo de fruktodonaj rilatoj kun ĵurnalistoj kaj redakcioj. Ni esploros ankaŭ la rimedojn, per kiuj oni povas pli efike kapti la atenton de amaskomunikiloj kaj konatigi Esperanton.

https://us02web.zoom.us/j/84539645494?pwd=bW1mbJak0goodEc87cDdhmWo97KtoC.1

## Novembra folifalo

La nuna novembro estas jubileoriĉa. Ni rememoros pri **Fernando de Diego, Ivo Lapenna, William Auld, Bakin** kaj aliaj forpasintaj eminentuloj, kaj sendos gratulojn kaj bondezirojn al **Halina Gorecka** kaj **István Nemere** okaze de iliaj jubileoj. Listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por novembro, kompilita de *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/11/novembro-11/ Legu kaj kunfestu!

## Slovena bulteno – solena promeno

Bonvolu trafoliumi la alkroĉitan novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj 2024/3 (septembro)*. Ĉiuj numeroj de la bulteno estas al dispono per la ligilo: http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0.

Redaktoro, Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL

## Oktobra kunpensado

Ni aŭdis pri la situacio en Poznano de Ilona Koutny, pri la oportuno por ekzameniĝi en la C2-ekzameno de Katalin Kovats (raportita aliloke en EKO). Okazis sukcesa seminario en Esperanto kun persa traduko en granda irana universitato Azad, kies sekvo estos reta kurso por la studentoj. Menciitaj estis la problemoj rilate al informado pri la reta Eo-kurso en la hispana malĉeesta universitato de Dennis Keefe,

kaj pri nova esperanto-kurso en la universitato de la urbo Hohhot (la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio). Antonio Leoni raportis pri la inter-lingvistika kunveno raportis pri la prelegoj ene de ĝi.

## Sumoo atingas la naŭdekon

La novembra sumoo komenciĝis la 10-an de novembro. Ĝi estas la naŭdeka, do mi volas havi pli ol 300 partoprenantojn. Ni kunlaboru por la celo. Hori Jesuo

## Ekskursoj tra kursoj kaj resursoj

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto por emerituloj
Gvidantonomo: Vida Kulikauskiene - Aldoninto: vaikuku
Lokoo: Panevėžys, Litovio

Nomo: UHE - Unua Helpo en Esperanto
Gvidantonomo: Frank Lappe, Aldoninto: Frank
Loko: Baugé-en-Anjou, Francio

Nomo: Kurso por progresantoj
Gvidantonomo: Rico Giacometto. Aldoninto: AnthonyLondono
Loko: Londono, Britio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27673

Nomo: Kurso por komencantoj en Parizo
Tipo: Nova movada kurso. Aldoninto: Pierre Gauthier
Loko: Parizo, Francio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27681

Nomo: Kurso por tut-komencantoj (Kurso I)
Gvidantonomo: James Hawkey. Aldoninto: AnthonyLondono
Loko: Londono, Britio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27668

Nomo: Kurso de E-o por komencantoj
Gvidantonomo: David Trigo Pérez. Aldoninto: DrThewolikan
Loko: San Ildefonso o La Granja, Hispanio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27679

Nomo: UNIVERSIDAD DE LEÓN
Gvidantonomo: Francisco Balibrea Iniesta. Aldoninto: DrThewolikan
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Leon, Hispanio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27680

Nomo: Kurso por komencintoj
Gvidantonomo kaj aldoninto: JOSEF VOJÁČEK
Loko: Brno, Ĉeĥio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27682

## Afrika bulteno ricevebla

Aperis la 51-a numero de la revuo *Esperanto en Afriko.* Ĝi estas elŝutebla per: https://uea.org/vikio/Dosiero:EeA_n-ro_51.pdf

Espoir Ngoma Kasati

## Poznano: Dek novaj trejnitoj pri instruado

Septembre en Poznanookazis la lastaj ekzamenoj kaj per tio finiĝis la 26-jara universitatnivela instruado de interlingvistiko. La nuna fino de la studoj signifas finon

ankaŭ de la universitatnivela trejnado de Esperanto-instruistoj. En la novaĵo legeblas informoj pri la studoj kaj la diplomitaj instruistoj. Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=912

Ni ricevis festan mesaĝon skribitan de Poŝraj Subedi, prez. de IKEF-Nepalo. Nome de IKEF ni gratulas al la nepala Novjaro Dashai, kaj kune ĝuas la festivalon.

sro Chielismo WANG Tiany, Prezidanto de IKEF. chielismo@hotmail.com

## ‘Bona volo’ kaj la Internacia Tago de Muziko

2024 markas la 25-an datrevenon de la Oratorio *La Mistero de Dio Revelaciita*, unu el la plej aklamaitaj muzikaj verkoj de la komponisto Paiva Netto. Laŭ lia difino ĝi estas ‘himno al Paco kaj al la Amo de Dio!’. www.paivanetto.com/eo

## Funebre en Litovio

La 26-an de septembro 2024 en Šiauliai (Litovio) en sia 86-a vivojaro forpasis **Zenonas Sabalys** (1939-2024), esperantisto ekde 1956, estarano de Litova Esperanto-Asocio kaj partopreninto en pli ol 20 UK-oj.. Legu nekrologon en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/09/nekrologo-73/

## Pledo de la lamanta SMG

Skribu al mi per minimume 12-punktaj literoj kaj prefere en tre simpla bone legebla litertipo. Mia pereanta vidkapablo postulas tion, eĉ kiam mi uzas lupeon! En miaj EKO-komunikoj, la bazaj tekstoj ĉiam estas per Arial 12, por ke mi pensu pri legantoj kun malpli forta vidkapablo!

## Hispana kongreso

La 82-a Hispana Esperanto-Kongreso okazis en septembro en Valencio kun pli ol cent partoprenantoj el dudek landoj. Legu prian artikolon de Dennis Keefe en la aŭtuna eldono de *La Ondo de Esperanto* (2024, №3) aŭ en la novaĵretejo ĉe https://sezonoj.ru/2024/10/hispanujo-5/

## Kursoj intense ofertataj

Nomo: Kurso por progresantoj
Gvidantonomo: Renato Corsetti. Aldoninto: AnthonyLondono
Aldoninto: AnthonyLondono
Loko: Londono, Britio
Vi trovos ĝin rekte ĉe https://edukado.net/kursejo?kid=27671

Nomo: Kurso por progresantoj
Gvidantonomo: Paweł Fischer-Kotowski. Aldoninto: AnthonyLondono
Loko: Londono, Britio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27674

Nomo: Kurso por komencantoj (Kurso II)
Gvidantonomo: John Greenwood. Aldoninto: AnthonyLondono
Loko: Londono, Britio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27669

Nomo: Lycée Victor CONSIDERANT
Gvidantonomo: Emmanuel DESBRIERES. Aldoninto: Flavavulpo
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko Salins-les-Bains. Francio.
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27677

Nomo: Lernu Esperanton!
Gvidantonomo kaj aldoninto: Andreas Zervas
Loko: Tesaloniko, Grekio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27678

## Pri la Junulara Kongreso

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis artikolo de la Moskva Esperanto-aktivulo Roman Raljko pri la 80-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Šventoji (Litovio) kaj pri la aventur-plena vojaĝo tien kaj reen. La artikolon garnas pluraj fotoj. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/litovio-76/

En EsperRadio youtube estas spekteblaj prelegoj de la AMO-seminario dum la hispana kongreso. Ekzemple la plej juna prelegantino Gabriela Manzano.

https://youtu.be/Uax5BfHj-bM?si=yNojLNSxMrSWCoUk

# Juna amiko meritas reabonon!

========= vortoj: 1020 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)




La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.